



REZOLUCIO DE LA 98-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Ni, 1034 partoprenantoj en la 98-a Universala Kongreso de Esperanto, venintaj el 55 landoj de ĉiuj mondopartoj al la plej norda ĉefurbo, Rejkjaviko, sur la insulo Islando, *diskutinte* en pluraj sesioj pri la temo “Insuloj sen izoliĝo: por pli justa komunikado inter lingvokomunumoj”;

konstatas, ke insuloj – historiaj, geografiaj kaj sociaj – estas originaj fontoj de biologia kaj kultura diverseco, kiujn indas konservi kaj protekti;

esprimas maltrankvilon pri la nuntempe akriĝantaj minacoj al tiu diverseco, pro pluraj homogenigaj kaj detruaj tendencoj de la regantaj ekonomiaj kaj politikaj sistemoj tutmonde;

samtempe bonvenigas la kreskantajn ŝancojn por translima kaj transkultura interkompreniĝo, kiujn donas la disvastiĝo de komunikaj rimedoj kiel Interreto;

atentigas pri la graveco de lingva diverseco kaj lingva justeco en la protektado de tiu kultura bunteco, kiun heredigis al ni la insuloj de la mondo;

memorigas, ke ĝuste tiu protektado de diverseco estas kerna valoro de la movado por la internacia lingvo Esperanto;

konfirmas la volon de la Esperanto-movado kunlabori cele al mondo de “insuloj sen izoliĝo”, kie ĉiuj lingvoj kaj kulturoj povas kunekzisti kaj plue disflori en reciproka respekto;

alvokas al mondvasta kunlaboro per lingve justaj rimedoj por kontraŭstari la minacojn de klimatsanĝo kaj biokultura homogeniĝo;

asertas la urĝecon de tia agado por konservi la trezorojn de nia insuleca planedo.

Komitato vigladebate

Okazis vendredmatene, la 26-an de julio, la lasta kunsido de la Komitato, kun emfazo sur la estonta agado. Ĝin karakterizis vigla kaj bonkvalita debatado.

Buĝeto 2014 estis akceptita, sed kun du montraj vojaĝkostoj reduktiĝos ĝis €9 000, sendokostoj ĉe Jarlibro reduktiĝos ĝis €6 500. Tio ebligis plusojn ĉe Movada Evoluigo: Edukado altiĝas ĝis €4 000 kaj Eksteraj rilatoj ĝis €3 000.

La buĝetoj por fondaĵoj en 2014 estis senmodife akceptitaj.

La Komitato konfirmis la decidon de la Estraro enrezervigi en la kapitalo sumon de cent mil eŭroj por renovigo de la asociaj retejo kaj administrado. La Estraro alprenas la devon regule raporti al la Komitato kaj membroj pri la realigo de la planoj.

Elektitaj estas nova konsisto por la Komisiono pri Financo kaj Administrado, kaj du novaj revizoroj.

La Komitato aprobis la starigon de Konsilio kaj regularon kiu difinas ĝian rolon. Post diskuto la sekvaj konsilianoj estis akceptitaj: Petro Baláž (Slovakio), Heidi Goes (Belgio), Huang Yinbao (Trezoro) (Ĉinio), Johannes Mueller (Germanio), Zsófia Kóródy (Germanio), Mélanie Maradan (Svislando), Francesco Maurelli (Italio), Veronika Poór (Hungario), Orlando Raola (Usono), James Resende Piton (Brazilo), Rafael Henrique Zerbetto (Brazilo), Amri Wandel (Israelo), István Ertl (Luksemburgo) kaj Michela Lipari (Italio).

La Komitato plie faris modifeton en la regularo de la Internacia Kongresa Universito kaj en tiu pri kotizperantoj. Restis malmulta tempo por diskuti la Strategian Planon. Oni atentigis pri la graveco pli bone konigi ĝin, laŭeble poparte per pli simplaj kaj klaraj tekstoj. Post la aldono de unu frazo pri E-kursoj por poŝtelefonoj, la Komitato akceptis la Strategian Planon.

Stefan MacGill, KN 412

Ragnarsson dulingve honorata

La granda esperant- kaj island-lingva poeto Baldur Ragnarsson persone ĉeestis la literaturan programon en lia honoro de la Akademio Literatura de Esperanto je la 14h00 en salono Lapenna. La poeto estas kandidato por la Nobel-premio pri literaturo. Eeseon pri li voĉlegis Nicola Ruggiero. Poemojn liajn en la islanda legis Siru Laine, kaj en Esperanto Spomenka Štimec. La titolo de la aranĝo estis “La poezio de Baldur Ragnarsson en liaj du lingvoj” – kortuŝa kaj altkvalita programo, kiu riĉigis la kongresanojn.

Spomenka Štimec, KN 505

Strategia Forumo

La partoprenantoj de la kunsido (vendredon la 26-an de julio, 14h00-14h45, sub gvido de Mark Fettes) diskutis ĝenerale pri la nova strategia laborplano de UEA kaj pri kelkaj novaĵoj, kiujn ĝi alportos. Ĉefe la konsilion kaj la novan plurlingvan retejon de UEA oni pridiskutis. Tiel facile eblos trovi informojn pri la laboro de UEA en kelkaj naciaj lingvoj. Alia grava afero estas, ke la nova retejo donos spacon ankaŭ al landaj asocioj (se ili ne havas propran retejon) kaj al fakaj asocioj.

Martin Schäffer, KN 708

Finiĝis diskutoj pri la kongresa temo

Ĵaŭdon je la 14h45 ni fermis la trian kaj lastan kunsidon dediĉitan al la diskutoj pri la kongresa temo, ĉi-jare sub la titolo: “Insuloj sen izoligo: por pli justa komunikado inter lingvokomunumoj”. La averaĝa partopreno estis proksimume 40 homoj,

kiuj dum la unua tago (dimanĉo) aŭdis la prezentadon de la reĝisoro enkonduke al la temo. Dum la dua sesio, en mardo, aperis la kontribuoj de tiuj kiuj reagis al la alvokoj publikigitaj en la revuo *Esperanto* (Amri Wandel, Wally du Temple, Mirejo Grosjean), kaj poste ni havis diskutojn en malpli grandaj grupoj, kiuj analizis apartajn temojn ĉerpitajn el la diversaj ideoj enkondukitaj en dimanĉo.

La rezultoj de la grupaj diskutoj, kune kun novaj kontribuoj (ekzemple de Humphrey Tonkin) aperis en la ferma ĵaŭda kunsido. En ĝi la ĉeestantoj havis la ŝancon analizi ĝisdetale la malneton de la Kongresa Rezolucio, kiun la Komitato de UEA analizos en sia lasta kunveno kaj prezentos al la kongresanaro por aprobo dum la Solena Fermo.

Resume, ni havis buntan trarigardon en la fenomenon de insuloj kaj izolitecoj en iliaj pozitivaj kaj negativaj flankoj, kaj en la maniero laŭ kiu novaj transportiloj kaj komunikiloj (precipe Interreto) povas ŝanĝi la insulan karakteron de nia mondo.

Orlando Raola, KN 266

Aikido

Kvankam aikido apartenas al la luktartoj japanaj, ĝi estas senperforta arto tre saniga por ĉiuj praktikantoj. Per aikido oni kreskigas sian koncentriĝkapablon, bonigas sian korpostaton kaj akiras defendoteknikojn.

En la ĉeesto de proksimume 40 personoj, ĵaŭdon tagmeze en salono Beleva, Mireille Grosjean prezentis tiun arton kaj ĉefe ĝian ligon kun Oomoto (ŝintoisma eklezio) kaj Esperanto laŭ historia vidpunkto.

AikidEo estas nova programo cele al konigo de Esperanto ĉe aikidistoj kaj konigo de aikido ĉe esperantistoj. Ĝi estas gvidata de Doktoro Klawe el Germanio kaj Mireille Grosjean el Svislando. Nuntempe laŭ nia scio la esperantistaj aikidistoj estas malpli ol dek.

Mireille Grosjean, KN 270

Prelego pri Skotlando ĉe IKEL

En mardo la Internacia Komitato por Enaj Liberecoj (IKEL) unuanime reelektis ĉiujn membrojn de la reprezentiganta komitato kaj ratifis la elekton de Alain Favre kiel prezidanto.

En la faka kunveno, kelkdekoj da homoj sekvis kun granda intereso la prelegon de Ed Robertson pri la demando “Kio okazas en Skotlando?” En la gastiga lando de la UK, kiu nur en 1944 iĝis sendependa Islando, aparte kongruis aŭdi ke Skotlando voĉdonos la 18-an de septembro 2014 por decidi ĉu disigi aŭ ne sian sorton disde tiu de Anglio, kun kiu Skotlando subskribis traktaĵojn de unuiĝo en 1707.

Nicole Margot, KN 385

MONA notas progreson

Kunveno de la Komisiono Meza Oriento kaj Norda Afriko (MONA) okazis la 25-an de julio inter la 15h30 kaj 16h30 en salono Dao Anh Kha kun la partopreno de dudek personoj. La situacio de Esperanto en la landoj de Meza Oriento kaj Norda Afriko estis klarigita. Notindas progresoj, krom en Turkio ankaŭ en kelkaj arablingvaj landoj (Maroko, Tunizio, Sirio).

Oni parolis pri la venontjara kunveno en Tbiliso, Kartvelujo. Interesiĝantoj pri la agado en iuj landoj bonvolu anonci sin al la adreso de la Araba Komisiono (araba.komisiono@esperanto.org).

Renato Corsetti, KN 39

Juristoj kunsidis

En la salono Beleva kunsidis 25 kongresanoj, por aŭskulti la raporton pri la pasintjara agado de Esperanta Jura Asocio. La prezidanto de la asocio, Prof. Rafaela Urueña (KN 109), prezentis agadplanon por la venonta jaro kaj disdonis la revuon *Jura Tribuno Internacia*, eldonatan en Hispanio.

Post demandoj kaj sugestoj de diversaj partoprenantoj, la prezidanto prelegis pri “Problemoj kaj kvereloj en la golfeto de Algeciras: la Traktato de Utrecht kaj ĝiaj konsekvencoj en Ĝibraltaro”. Por daŭrigi la kutimon prelegi pri faka temo dum jarkunsidoj, s-ro Ivo Osibov prelegos venontjare pri maraj malkonsentoj inter Kroatio kaj Slovenio.

La prezidanto kuraĝigis la ĉeestantojn kunlabori en nia revuo per artikoloj, juraj novaĵoj el diversaj landoj ktp, kaj aliĝi al nia asocio.

Rafaela Urueña, KN 109

Rondo “Kato” kunsidis

“Oni do metis min en kaĝon kaj portis al Harpa. Tie laboras mia patrino, Lóló. Kaj jen tie ŝi malfermas la kaĝon kaj ellasas min kaj min provas kapti areto da persekutantoj. Ili parolas strangan lingvon ĝis nun neniam auskultitan de mi, eĉ ne en televido. Sed iel mi duonorele komprenas, ke ŝajne ekzistas iu maljuna reĝino ilia, nomita Miaŭrjorie, kiu lastatempe estis malsana sed jam resaniĝis kaj sidas en sia kastelo denove. Ŝi verkis eĉ libron pri ni, Kvarpieda kamarado. Eĉ aperas iu novaĵletero pri ni en tiu stranga lingvo. Mi kompreneble faris eĉ ne la plej etan streĉon miaŭi en tiu lingvo, mi ja estas siama kaj sekve ne parolema sed mi ja plendis al mia panjo. Ŝi ofertis al mi mian plej ŝatatan sekigitan fiŝon, sed mi indiferentis al ĝi kaj proteste nur eniris la kaĝon kaj jen ŝi forportis min hejmen.”



Ekskurso al Gronlando



La ekskursata tago, merkredo, ĉi-foje havis ion tute nekutiman: vojaĝon al Gronlando. Flugon 1233 de Air Iceland el Rejkjaviko al Kulusuk plenigis kvindek esperantistoj. La flugo mem, neoficiale baptita “Zamenhof” de KKS Clay Magalhães, prezentis, eble je la unua fojo en la historio de nia lingvo, la flugsekurecajn anoncojn en Esperanto.

Sunplena tago kaj varmeta vetero (multe pli varma ol en Rejkjaviko, ni ja ŝvitis tie) plene inspiris nin plenpulme ekmarŝi ĉirkaŭ ses kilometrojn, ekde la momento mem de la alteriĝo. Ni ĉirkaŭiris piede la vilaĝon Kulusuk, haltante ĉe ĝia tombejo, ĉe ĝia preĝejo, ĉe la vilaĝo mem, kie ni admiris buntajn tradiciajn dometojn el ligno. Impona pejzaĝo kun montoj kaj eĉ glaĉero – kiun ni surmarŝis – fascinis nin per belo. Krome, plejparto el la ekskursantoj ĝuis la revenon al la flughaveno per boato inter glacimontetoj. Kronis nian viziton sinprezento de loka inuito, nepo de la heroino de la vilaĝo, kie ni admiris skulptaĵon dediĉitan al ŝi. La nepo interpretis per voĉo kaj perkutinstrumento du kanzonojn plenajn de mimiko kaj onomatopeoj pri romanco inter birdoj.

En la revenflugo la KKS disdonis diplomojn pri la vizito al Gronlando. Restis al ni fotiloj plenaj de sovaĝaj floroj, bluegaj montoj akrapintaj, kaj kapricformaj glacimontetoj.

Francisco Veuthey, KN 785

Amerika Komisiono

La ĉeestantoj el pluraj landoj de Ameriko prezentis la situacion de Esperanto en la unuopaj landoj kaj oni diskutis pri la estonto de la agado. Por 2014 grava afero estas venigi aktivulojn el la tuta Latinameriko al la eventoj en Argentino, Brazilo kaj Urugvajo. Kongresanoj estas petataj donaci por tiu projekto kaj ĝenerale por Amerika Agado kaj transdoni tiun rekomendon al amikoj. TEJO petas subteni la fondaĵon “Partoprenu IJK”.

Martin Schäffer, KN 708

Kunveno pri UN kaj Unesko

Stefano Keller, la reelektita estrarano pri eksteraj rilatoj kaj ĉefrepresentanto de UEA ĉe UN en Ĝenevo, enkondukis la kunvenon pri UN kaj Unesko (ĵaŭdon, 12h45 en salono Lapenna) per informado pri la mesaĝoj de Rita Izsák, sendependa eksperto de UN pri minoritataj aferoj, kaj de aliaj mondrenomaj fakuloj pri lingvaj rajtoj. Temas pri tekstoj favoraj al Esperanto, kiuj jam ekaperas rete: <http://www.linguistic-rights.org/esperanto-125/>. Tiu materialo estas tre taŭga por informado kaj por konvinko de la publiko ĝenerala, oficista aŭ eĉ altrangula.

Poste, Keller kun Humphrey Tonkin, ĉefrepresentanto en Novjorko, prezentis la agantojn kaj agadon de UEA ĉe la mondorganizaĵoj: Unuiĝintaj Nacioj (Vieno, Ĝenevo, Novjorko) kaj Unesko (Parizo). Ili alvokis por kunlaboro de diverslandaj aktivuloj subtene al la prezentado de esperantistoj kiel defendantoj de lingvaj rajtoj. Konkretaj paŝoj estu farataj per kontaktado de lokaj UN-asocioj kaj Unesko-komisionoj, kies kunvenoj estas tre taŭgaj por diskonigi niajn celojn.

Elisabeth Barbey prezentis sian agadon en kunlaboro pri projektoj kaj iniciativoj de Unesko, kaj la diversajn aktivaĵojn, kiujn ŝi efektivas kun alilandaj aktivuloj (FRINGOJ, lernejaj kontaktoj). François Lo Jacomo, komisiito ĉe Unesko en Parizo, informis pri sia kontribuo al la laboro de la Pariza UEA-teamo.

Demandoj de la ĉeestantaro estis responditaj. Trejnado por aktivuloj pri eksteraj rilatoj estas planata. La estraro kaj la komisiitoj atendas kunlaborproponojn de la membraro el la tuta mondo, ĉu forme de rilata loka agado, ĉu kadre de la UN/Unesko-organizo, ĉu forme de tradukaj kontribuoj.

Stefano Keller, KN 61

Nefumantoj kontraŭ fumado

Tutmonda Asocio de Esperantistaj Nefumantoj (TADEN) kunvenis mardon en salono Lapenna, kun 12 ĉeestantoj el 7 landoj, inkluzive de Brazilo, Japanio kaj Koreio. Gvidis la kunvenon Jan Bemelmans (KN 851). Okazis diskutoj interalie pri la jenaj aferoj. En Nederlando meze de la sekva jaro regos fum-malpermeso senescepta. La tabaklobie ligita sanministro (liberala) devis transdoni la tabak-politikon al socialista subministro. Ankaŭ alilande oni ankoraŭ suferas: alergiulo ofte devas forlasi kunvenejon kie nura plank-strio dividas fum-areon disde senfuma. Kaj surterasoj fumantoj – laŭ Pasquale Zapelli – simple ne povas imagi ke ilia fumo restas ĝene pendanta en la spirata aero. Li ankaŭ trovis cigared-reston en la kongreseja necesejo.

Ni disdonis la lastan numeron de *Puraj Pulmoj* kaj resumis la kortuŝan rakonton de Wanda de Kanter, nederlanda pulmistino, kiu bataladis kontraŭ ekfumemo de infanoj. Ĝuste virinoj altigas la lastjaran statistikon, logate de aromaj cigaredoj. En Germanio ĉe trajnhalto oni ebligas al fumantoj eliri por cigaredi sur la fum-areo. Iliaj vestoj fumtrempitaj poste ĝenas apudajn pasaĝerojn, sed tion ne menciis la televida elsendo. La nederlanda drogpolitiko – diferenco inter malfortaj drogoj kaj tabakfumo jam malpliigas – fariĝas pli severa, tamen urbestro deklaris ke oni ne kontrolos. Alkoholismo inter junaj lernantoj kaŭzas eĉ pli ol duonhorajn komatojn. Sed oni altigos la aĉet-permesan aĝon, samkiel por tabakaĵoj, al la 18-jariĝo.


Rob Moerbeek, KN 51

Parkera kantado de *La Espero*

Entuziasmo regis! Enkondukis la kunvenon Hori Jasuo rakontante pri sia propra nekapablo parkere kanti nian himnon. Eĉ nun eblas konstati fermitajn buŝojn sur la podio de nia kongreso. Por forigi tiun hontindan mankon, necesas instrui la tekston al ĉiuj kongresanoj. Ĝis nun ekzistas 70 atestoj pri la parkera kantado; dum tiu ĉi kunveno sukcesis aldoni 9 pliaj. Ĉiu akirinto de atesto rajtas mem ekzameni kaj sendi la rezultojn al la adreso de Hori Jasuo (hori-zonto@water.sannet.ne.jp). Lavange kresku nia afero!

Dieter Rooke

Recenze pri kiel recenzi



Jen iom malfrue pri la Kleriga Lundo-sesio pri “Kiel recenzi diskon”, 09h00-10h30 en Dao Anh Kha. Gvidis la intime negrandan sesion la brita esperantisto Paul Gubbins, fama Esperanto-aŭtoro, kiu prezentis sin ĉefe kiel ĵurnalisto kaj redaktoro de *Monato*.

Positive impresis, ke la sesio estis bone preparita: detala plano, kun tempo-skemo, videbligita sur-ekrane, same kiel pliaj lumbildoj. Estis tre interaktiva sesio, ne iu magistra kurso, kun ebleco ĉiam fari demandojn kaj komentojn.

Unue, “cerboskrapado” pri tio, kio kaj kial estas recenzado. Diskuto pri la necesa ekvilibro inter draŝado kaj laŭdado. Poste, analizado de pri-muzikaj recenzoj aperintaj en *Monato*. Sed la kerno de la sesio estis praktika ekzerco pri recenzado de aŭdigita kanzono de Kajto. Grupe aŭ individue, la ĉeestantoj devis per 150 vortoj recenzi la kanzonon objekte kaj “morse” (*Muziko, Opinio, Rekomendo, Stilo, Enhavo*).

La grupanoj liveris siajn recenzojn, poste Gubbins montris la sian. Fine estis projekciita pritema artikolo de Marjorie Boulton, kiu konsilas recenzi humilece kaj pli ĝentile “ol estus devige por iu nacilingva verko”, kio iomete kontraŭdiris la rekomendon de Gubbins.

Konklude, estis tre utila interaktiva sesio. Estintus eĉ pli bone je la fino, se la gvidanto estus proponinta iaforman resumon de la sesio, kun la ĉefaj gvidlinioj pri la arto recenzi kaj kun la enhavo de la sesio.

Aleks Kadar, KN 690

Atenton!!

Bedaŭrinde mi trovis preseraron en mia hajko aperinta en *Aŭroro* 5. En la 3-a verso de la unua peco, “marĉlandoj” devas esti “marĉlanoj”. Marĉlano, alinome erioforo (*Eriophorum*), estas herbo kun lanugo simila al kotono.

HIROTAKA Masaaki, KN 802

[Bv. pardoni la eraron. Mi ne konis la koncernan vorton, kiun ni ne povis trovi en PIV, kaj tial aldonis la misan *d.* Cetere, dankon al tiuj kiuj helpis pri la prilaborado de *Aŭroro* ĉi-semajne, precipe Claude Nourmont pro tekstoj, Rob Moerbeek pro provlegado kaj Julia Noe pro entaĵoj. –Red.]